

12



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

DECEMBRO 1963

ENHAVO

* * La jarkunvenoj	1
Deika Ĉolakova. Sen junularo ne eblas idea movado	2
Verdstelanoj. La unua ŝtata kurso por Esperanto-instruistoj	4
Petko Arnaudov. La Beograda lerneja konferenco kaj la junularo	5
Atanas Lakov. Provo alfronti la vivon	8
Atanas D. Atanasov — Ada. Dudek-kvara leciono	10
Teodor Kulagin. El Sovetunio	11
K. Tocev, S. S., Rosica Georgieva. Organiza vivo	13
Katrin Bossong — Singer. Gastama akcepto	14
Julio Varga. Harmonio (versaĵo)	15
Petro Poliŝĉuk. Saluton al Sofio (versaĵo)	15

TRA LA GAZETARO

Abonkotizo: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2lv, 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; korespondanconcoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



LA JARKUNVENOJ

Lcŭ decido de CK de BEA la jarkunvenoĵ okazos inter la 10-a de decembro kaj la fino de februaro. Ili efektiviĝos en pli favoraj cirkonstancoj, aperintaj post la 48-a UK en Sofio. Nun la intereso al Esperanto estas alta kiel neniam kaj ni devas bone utiligi ĝin. La jarkunvenoĵ estas tre grava momento en la vivo de ĉiu ajn organizaĵo, ĉar oni en ili faras analizon de la agado dum la tuta jaro kaj planas la estontan jaran agadon. Tre grava ilia elemento estas ankaŭ la elekto de la homoj kiuj gvidos la societajn aferojn. Pro tio de la grado de la preparo kaj la kvalito de la efektiviĝo de la jara kunveno grandparte dependas kia estos la agado de la societo dum la jaro, kiaj estos ĝiaj rezultoj.

La raportoj devas esti kolektiva verko de la tuta estraro kaj ne nur de la prezidanto aŭ de la sekretario. Ĝi devas konsideri la kongresan rezolucion, la decidojn de la plenkunsidoj de CK de BEA kaj la decidojn de la pasintjara jarkunveno de la societo. Tre grava punkto estas la elekto de nova estraro. Oni povas fari tre bonan planon por agado, sed se ĝi trafus inertajn manojn, ĝi restus nur surpapera plano. Oni devas tre atente kaj analize pridiskuti la elektotojn. En iuj societoj oni tre emas elekti nur pensiulojn. Tio estas tre malbona signo por nia movado. Ni utiligos la sperton de niaj malnovaj pioniroj. Sed ni devas konsiderinde junigi nian asocion. Movado sen junularo estas senperspektiva. En la vicoj de nia junularo estas bonaj kaj talentaj junuloj. Ni ne devas timi doni al ili gvidpostenojn en la societoj. Laborante kun la maljunaj agantoj ili rapide spertiĝos kaj refreŝigos la movadon. Tio certe alportos plivigliĝon. Pli kuraĝe ni elstarigu junajn homojn en nia movado!

En la novaj favoraj kondiĉoj, nur de ni, de nia prudenta laŭplana laboro, de nia taktiko kaj takto, dependas niaj pluaj sukcesoj.



La daŭra kaj kuraĝa kresko de la junulara aktiveco, kiu okazis dum la pasintaj kelkaj jaroj, kulminis en la Jaro de la Junularo. La bona organizo de la 19-a TEJO-Kongreso en Vraca plej impone signis tion. Ĝi montris la maturecon de nia Esperanto-junularo, kiu venkis multajn barojn kaj realigis modelan organizon de la kongreso. La kongreso alportis ankaŭ novan reputacion por la junularo — reputacion ne pri ia „esperantista idealismo“ (kiu tamen ne mankas), sed pri celkonscia kaj bone orientita aktivado en la ĝenerala movado de la junularo.

La 48-a UK kaj la 19-a TEJO-Kongreso kreis tre favorajn cirkonstancojn por laboro kaj speciale en la junularo, kiujn oni nepre devas utiligi. La entuziasmo, plejparte de la novaj esperantistoj, kiuj ĝuis senpere la atmosferon de internacia junulara amikeco, rapide malkreskus, se oni ne subtenus ĝin daŭre. Banale estas ripeti la evidentan fakton, ke la junaj esperantistoj de la nuntempo prezentas la estontan movadon. La nuntempaj anoj de la junulara movado post kelkaj jaroj estos agantoj de la ĝenerala movado. Sed por tio estas necesa konstanta, daŭra kaj pacienca eduka kaj propaganda laboro. Estas necesa la komprenemo de la malnovaj agantoj. Dum la lastaj jaroj ni konstatis, ke en tiuj lokoj, kie oni komprenemas kaj komprenas la junularon, ĝi amase aliĝas al la movado. La societa vivo plivigliĝas. Tre elokventaj tiurilate estas la ekzemploj de Minajlovgrad, Pazarĝik, Vraca, Polski Trâmbeș, Ruse, Stara Zagora, Kubrat k. a. Sed ekzistas bedaŭrinde societoj, kies ferma rondo jam de jaroj restas la sama, sidas triste blankharuloj en kunveno kaj priploras la junularon, „kiu iras ne laŭ ĝusta vojo kaj ne interesiĝas pri seriozaj aferoj,

kia estas Esperanto“. Tiaj priplorantoj estis ekzemple la eksestraranoj de la societo en Sliven, kiuj multajn jarojn ne sukcesis vivi la societon. Sed venis novaj homoj, kiuj turniĝis ne laŭvorte, sed fakte al la junularo kaj tuj eligis la societon el la stagnado.

Oni devas kompreni, ke la junularo havas siajn specifajn interesojn kaj postulojn. Tiudirekte ne utilas la trompifa mentoreca rilato kaj moralumado. Ne konvena estis ekzemple la rilato de la estraro de la Sofia societo „M. Gorkij“, kiu dum du jaroj ne sukcesis certigi klubejon por la junularaj kunvenoj. Al la insisto de la junuloj oni respondadis: „Vi partoprenos niajn kunvenojn. Vi ne bezonas apartajn“. Oni povus aŭdi eĉ tiajn „argumentojn“: „Vi obeos nin. Ni estas pli maljunaj kaj pli bone ol vi scias ĉion. Vi ne kontraŭdiru“. Kaj la junuloj obeas. Ĉiusemajne ĉirkaŭ 30 junuloj „trankvile“ atendis la finon de la ĝenerala kunveno, por povi ĉirkaŭ la 22-a horo komenci sian kunvenon, se kompreneble, oni ne forpelos ilin de la klubejo. Tiamaniere oni nature ne varbus la junularon por la movado. Ĝi estas tre sentema kaj ŝatas mem aranĝi siajn sociajn aferojn. Ne hazarde en nia lando kaj ĉie en la mondo ekzistas apartaj organizaĵoj de la junularo. Per la Komsomolo, kiu disponigas memaktivecon, la junularo edukigas, lernas la regadon de la sociaj aferoj, tie oni forĝas la morgaŭajn sociajn agantojn, gvidantojn de la produktado, aktivulojn de la ekonomia, la kultura kaj la ŝtata vivo.

En la nuna stadio de nia landa movado ne estas necesa aparta junulara organizaĵo. Sed al la junularaj grupoj ĉe la societoj oni devas disponigi kondiĉojn por relative memstara agado, sub la proksima observado kaj

sperta idea gvidado de la societaj est-raroj. Tie formiĝos la anstataŭontoj de niaj maljunigintaj pioniroj. Tie ni forĝas nian estontecon.

Kaj kreskas jam junuloj al kiuj ku-raĝe ni povus fidi respondecan laboron en la societo. Ni ne devas timi tion. Eble la juna homo posedas multajn malperfektaĵojn. Neniu estas perfekta. Nia tasko estas eduki. Plej facile oni povas eduki la junan homon. En nia anaro elkresku novaj spertaj lingvo-uzantoj, lertaj gvidantoj. Ni devas ba-tali por ĉiu juna homo. Helpate la junuloj pli facile vastigos siajn penso-horizontojn, konstante ĉerpante sciojn kaj spertojn en la trezorejo de la 'per-toj de la malnovaj kaj pli grandaĝaj Esperanto-agantoj.

Ni ne disponas multajn spertajn, bonajn organizantojn, influajn propa-gandantojn, elstarajn instruantojn, peda-gogojn. Se ni esplorus ties konsiston ni konstatus, ke eble ilia meza aĝo estas ne malpli ol 50 jaroj. Ekzemple la meza aĝo de la sepmembra estraro de la Sofia s-to „M. Gorkij“ estas ĉirkaŭ 51 jaroj. Nur unu membro estas relative juna — 28-jara. En aliaj so-cietoj la stato prezentas eĉ pli neespe-rigan bildon. Lima tempo estas jam alpaŝi de sloganoj al reala laboro pri varbado de junuloj, pri ties prudenta, regula, laŭplana kaj takta edukado, al-tiri ilin al respondeca aktiveco en la movado.

La kreskanta intereso al Esperanto, la tendenco al laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn starigas antaŭ ni la bezonon pri instruistoj. Sed kie ni trovos ilin, se ne inter la junuloj. La komenco, metita en la Sofia Ŝtata Universitato — la fakultativa lernado de Esperanto fare de la studentoj en la filologia fakultato, tute ne sufiĉas. Ne nur filologoj povas esti bonaj instru-istoj. Ekzistas ankaŭ aliaj junuloj, kiuj bone regas la lingvon, tamen al ili man-kas pedagogia sperto. Kial ne organizi

por ili specialan kurson por instruistoj. Tie la pli spertaj esperantistaj instru-an-toj povos transdoni al la junuloj siajn spertojn kaj sciojn. Samtempe oni kon-fidu al ili praktikan gvidadon de kursoj. La tiurilata provo en Miĥajlovgrad kaj Pazargik donis sekvindajn rezultojn. La konstante kreskanta nombro de par-toprenantoj en la oratoraj konkursoj montras la progreson de la junuloj en la regado de la lingvo. Tamen inter la junuloj ekzistas ne nur bonaj oratoroj, sed ankaŭ esperigaj Esperanto-poetoj, verkistoj, tradukistoj. Por instigi ilin ni organizu specialajn rondojn, kursojn, skolojn, seminariojn, konkursojn, kiuj certe plivigligos la intereson.

Kiam inter la junuloj montriĝos iuj pli spertaj, pli talentaj kaj esperigaj oni speciale devas okupigi pri ili, indi-vidue labori por ilia elkresko kiel or-ganizantoj kaj propagandantoj de la movado. Oni devas doni al ili apartajn taskojn — ĉu pri tradukado, verkado, ĉu pri organizaj aferoj, kontroli kaj samtempe helpi ilin.

Se la malnova generacio ne suk-cesus krei siajn anstataŭontojn, ĝiaj meritoj estos kripligitaj. Sen junularo ne eblas vivokapabla, kreskanta mo-vado. Ni kreu la granitan bazon nome de tia movado!

Delka Ĉolakova

NR. La ĉi-supra artikolo starigas gravajn demandojn pri nia rilato al la junularo kaj la zorgoj kaj la eduka laboro al ĝi. Ni konsideras la artikolon diskutinda en kunveno kaj est-raj kunsidoj. Pri la esprimataj opinioj, propo-noj, atentigoj, bonvolu sciigi la redakcion. Ni volonte publikigus la plej interesajn materialojn.

Ekzistas ankoraŭ societaj estraroj, kiuj ne elŝuldiĝis al la asocio pri la membro-kotizo. Tio forte embarasas nian agadon. Ni ne devas eniri en la novan jaron kun ŝuldoj. Pro tio tuj pagu la membrokotizon! En la februara kajero de BE ni anon-cos la malakuratajn societojn.

LA UNUA ŜTATA KURSO POR ESPERANTO-INSTRUISTOJ

La gekursanoj nomis ĝin „La esperantista skolo de Kladova“ kaj tiu ĉi nomo plaĉis al ili. Nemirinde, se ĝi restas ankaŭ estonte — dum la sekvantaj jaroj tien ĉi eble venados novaj sindonaj geinstruistoj, amantaj la noblan Esperanto-aferon.

„Skolo de Kladova“ — ĉar la kurso okazis sur „Kladova Herbejo“, bela loko, kiu troviĝas je dudek kilometroj de Velingrad, ĉe la piedoj de la okcidentrodopa montopinto „Ĉernovec“ (1860 metrojn alta). Ĉarma konifera arbaro ĉirkaŭas la herbejon, meze de kiu staras koketa turista monto-domo — logejo de la gekursanoj. Sankta loko por la bulgara esperantistaro! Je distanco de tridek minutoj troviĝas la rokoj, inter kiuj pereis en batalo kontraŭ la faŝistoj la popola heroino Vela Peeva. Nun la naskiĝurbo de la partizanino-esperantistino portas ŝian nomon. Je la sama distanco en kontraŭa direkto estas la loko, kie la faŝismaj barbaroj pafmortigis, post 52-taga inkvizicio, la partizanon-esperantiston Stoju Kalpazanov. Nun lian nomon portas la esperantista societo en Velingrad. Ambaŭ mortis — ambaŭ vivas... Sur iliaj pereolokoj la danka bulgara esperantistaro starigis marmorajn platojn kun surskriboj en Esperanto.

La kurso okazinta dum 18—31 de aŭgusto, estis organizita de fako „Popola Klerigo“ ĉe la Distrikta Popola Konsilantaro en Pazarĝik, helpe de la esperantistaj societoj en Pazarĝik kaj Velingrad. Ĉin partoprenis 13 geinstruistoj el Pazarĝik, Velingrad, Peŝtera, Batak kaj unu el Plovdiv. Lektoro estis la konata kursgvidanto el Sofio Kun-o Vălev.

Ĉiutage antaŭtagmeze la gekursanoj 3 horojn okupiĝis plejparte pri gramatiko — estis tuŝitaj ĉiuj pli gravaj ĝiaj punktoj; posttagmeze 2 horoj es-

tis dediĉataj al parolekzercoj je diversaj temoj. Ĉiu el la gekursanoj havis provlecionon. Ĉio ĉi grave helpis la perfektigon de la partoprenintoj kaj la plibonigon de la korekta uzado de la lingvo fare de la partoprenintoj kaj la pliriĉigon de ilia vortaro.

Sed la instruistoj bone konas ankaŭ la rolon de la kantado ĉe la instruado. Tial je la fino de ĉiu leciono aŭ parolekzerco oni kantis. La lektoro, posedanta riĉan repertuaron de esperantaj kantoj, sukcese transdonis ĝin al la gekursanoj.

Oni speciale devas noti la vesperojn. Ili estis veraj festoj por ĉiuj. Sur la herbejo ekbruladis forta fajro, kies langoj kvazaŭ lekis la montan ĉielon. Ĉirkaŭ la fajrujo — esperantaj kaj bulgaraj kantoj, deklamado, ludoj, amuzado... Notindan rolon havis la miel-dolĉa ŝalmo de Baj Kosta el Pazarĝik kaj la belsona fluto de k-do Marinov el Velingrad.

Krom la lernado, tage la gekursanoj havis eblecon okupiĝi ankaŭ pri aliaj aferoj: ili formis laborbrigadon kaj purigis de ruboj la ĉirkaŭan surfacon, faris ekskursojn ĝis la supro „Ĉernovec“ vizitis la pereolokojn de V. Peeva kaj St. Kalpazanov. Oni speciale devas noti la sindonan laboron de la nelacigeblaj kamaradoj Petko Arnaudov el Pazarĝik kaj Manol Ĉolev el Velingrad por la bona funkciado de la kurso.

Ĉiuj gekursanoj lernis fervore. Kaj ilia penado ne restis vana: la ekzamenoj fine de la kurso montris tre bonan sukceson. La ekzamenkomisiono, konsistanta el la lektoro kaj la kamaradoj Simeon Hesapĉiev (prezidanto de la Instruista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio, veninta speciale el Sofio por tiu ĉi celo) kaj Petko Arnaudov — ambaŭ membroj de CK de



prenintoj rilate lingvan, gramatikan kaj metodikan nivelon.

La problemoj pri preparo de bonaj specialistoj-instruistoj de Esperanto havis ĉiam ekskluzive gravan signifon por la disvastigo de la lingvo. Des pli grava ĝi estas nun, kiam la vivo pli akre starigas la problemon pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La vojo, kiun montris la kamaradoj el Distrikto de Pazarĝik, estas certa kaj fruktodona vojo. Ĝi estas sekvinda.

BEA, konstatas, ke la dusemajna kurso grave helpis la progreson de la parto-

Verdstelanoj

JUNULARO SUR POSTENO

LA BEOGRADA LERNEJA KONFERENCO KAJ LA JUNULARO

La celo estas bonega — enkonduki Esperanton en la lernejojn, la maniero estas klara — gajni la necesajn poziciojn en la lernejoj mem kaj inter la gelernantoj (kompreneble la geinstruistoj).

Kio estas ĝis nun farita — modesta, sed rimarkinda. En la konferenco estis reprezentitaj minimume 250 lernejoj kaj partoprenis 300 geinstruistoj instruantaj Esperanton. Kompreneble certa kvanto kaj ŝajne sufiĉe pli granda restis nereprezentita. Tamen tio jam estas sufiĉe bona pozicio de kiu ni povas daŭrigi la pluan atakadon de la citadelo nomita LERNEJO.

Grava rimedo estas senlace kaj konstante heroldi pri ĉiu, eĉ plej eta sukceso kie ajn ĝi estu. Por gajni ankaŭ la gepatran socion ni vaste devas diskonigi la rolon de Esperanto en la edukado de moralaj, sociaj, intelektaj kaj aliaj pozitivaj ecoj de la juna homo. Kaj ĉiam pli kaj pli ni devas orientigi nin al preparo kaj kvalifiko de E-instruantoj. Ni devas pliriĉigi nian fakan literaturon kaj gvidlibrojn por E-instruado. Ni devas variigi la enhavon de la eksterklasaj aktivecoj de la gelernantoj, kiuj lernas Esperanton kaj akceli la kunlaboron kun la aliaj lernejoj kaj eksterlernejaj instancoj ligitaj kun la lernejoj. Ĝuste tiurilate gravan rolon povas ludi „ORA SPIKO“, „GRAJNOJ EN VENTO“ ktp., kiujn ni devas ĉiamaniere subteni.

Kaj jen, ni estas antaŭ la problemoj pri la rolo de TEJO en la lerneja kampanjo. Ĝi estas grava kaj ni povas ĝin igi decida. Se la gelernantoj prenas la iniciaton — kaj ili nepre ĝin devas preni, ĉar la ĉefaj faktoroj estas ili, la plenumantoj de la plimulto el la supre dirita — oni kontentigos, aŭ almenaŭ ne malhelpos la kontentigadon de ilia deziro, ĉar la demalsupra voĉo estas obeata

kaj la volo de la amasoj — ĉion venkanta. Sed nia gelernanta amaso ne povas kaj ne akceptos la Esperanto-instruadon spontane, hazarde. Al ĝi oni multon devas klarigi, multon devas montri, pruvi, ĝia entuziasmo devas esti flamigita. Jen, ĝuste tio devas esti la enhavo de la laboro de TEJO. Se nur la aĝuloj predikas kaj admonas, sed niaj junularaktivuloj, niaj TEJO -anoj staras flanko, nia laboro en la lernejoj kaj en ĉiu alia junulara medio lamos kaj la rezultoj neniam korespondos al la klopodoj. TEJO de nun devas krei en la estontaj gvidantoj de la scienco, la literaturo, la socia vivo ambicion verki ankaŭ en Esperanto, tradukadi en Esperanton, apliki la internacian lingvon ekde nun en sia ĉiutaga scienca, ofica aŭ amuza aktiveco. Jen kial ĉiu estraro de junulara Esperanto-grupo, ĉiu TEJO-ano devas pripensi kaj plani sian laboron laŭ la supre dirita, laŭ la rezolucioj akceptitaj en la Beograda konferenco.

Detaloj pri la konferenco kaj la rezolucioj estas troveblaj aliloke. Do, al obstina kaj pacienca laboro!

Petko Arnaudov
Pazarĝik

20-a INTERNACIA JUNULARA ESPERANTO-KONGRESO

AMSTERDAM — Nederlando, 8—15 aŭgusto 1964

Adreso: Kastelenstraat 231.

AMSTERDAM Z. — Nederlando

Poŝtekkonto: 686965 nome de: 20-a IJK. Zaandam.

Protektanto: La Rektoro de la Universitato en Amsterdam — prof. D-ro J. Kok.

Kongresejo: Internacia junularcentro „Anne Frank Domo“ — la domo, kie en la dua mondmilito vivis kaŝite Anne Frank, konata pro sia „Taglibro“.

Provizora programo: Interkona vespero, solena inaŭguro, rondveturo en boato tra la graĵtoj kaj la haveno, muzea vizito, kultura vespero, oratora konkurso, prelegoj kaj diskutoj, balo, filmprezentadoj, laborkunsidoj de TEJO, ekskurso al la fromaĝfoiro de Alkmaar k. a.

Kotizoj: La kotizoj inkluzivantaj loĝadon, manĝadon kaj la kongresan programon estas por membroj de TEJO:

	antaŭ 1.04. 1964	post 1.04. 1964
malpli ol 20-jaraj	70. — ned. gld.	80. — ned. gld.
pli ol 20-jaraj	75. — „ „	85. — „ „
Nemembroj de TEJO pagas 5 ned. gld. pli.		

Aliĝo: LKK ne traktos aliĝilojn antaŭ ricevo de la kompleta kotizo. Aliĝilon kaj pagon do sendu ĉiam al la sama adreso. Pagado de la kongresa kotizo estas ebla nur rekte al la kongresa poŝtekkonto (vidu supre).

En kazo de neebleco partopreni, la aliĝinto rericevos la pagitan kotizon minus 10 ned. gld., kondiĉe ke LKK estu informita antaŭ la 15-a de julio 1964. Kongresanojn pli ol 25-jaraj oni ne akceptas, escepte de funkciuloj de TEJO, gastoj kaj en aliaj kazoj difinotaj de LKK.



De la 27. XII. 1963 ĝis la 2. I. 1964 okazos en München la 7-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo pri la temo: „Eŭropa kulturo — ĉu unueco en vario?“. Post prelegoj de fakuloj kaj universitataj profesoroj, la seminarianoj diskutos pri la temo. La distra parto de la arango antaŭvidas viziton al la fama amuz-kvartalo „Schwabing“, novjaran balon k. a. Krome la seminarianoj vizitos la iaman nazian koncentrejon Dachau.

La 22-an de junio 1963 okazis sur Lovón la jarkunveno de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, kiam estis elektita ankaŭ nova estraro de SEJU kun prezidanto S-ro Lars Olsson el Höör.

La nova sidejo de Pola Esperanto-Junularo estas en Wrocław, str. Dubois 3, ĉe la sekretario Edward Wojtakowski. La nova prezidanto de PEJ estas s-ro Adam Plešnar same el Wrocław. Al Wrocław estis transloĝigita ankaŭ la redakcio de „Tamen“.

Germana Esperanto-Junularo eldonis germanlingvan propagandan flugfolion „Sich verstehen — aber wie?“, bone aranĝita kun taŭga teksto kaj fotoj. Anglalingvan folion speciale por studentoj eldonis Junularo Esperantista Brita.

Hungara Esperanto-Asocio preparas la fondon de junulara sekcio, kiel sekcio de TEJO. Dum aŭgusto 1963 en la internacia tendumejo ĉe Primošten — Jugoslavio estis organizita la unua „semajno“ de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (STELO). Ĉeestis studentoj kaj aliaj esperantistoj el Britio, Bulgario, Francio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Svedio k. a. precipe revenantaj de la kongresoj en Bulgario. Okazis kelkaj prelegoj kaj diskutoj pri aktualaj temoj. Dum la „semajno“ kunvenis ankaŭ la nova estraro de STELO, kiu prilaboris sian agadplanon.

ЛИКВИДАЦИЯ НА МАРКИТЕ-ТУХЛИ

Комисията, назначена от ЦК на БЕС за привеждане в известност на марките-тухли и постъпилите от тях суми, привърши своята работа. Всички, останали непласирани и върнати марки-тухли, бяха унищожени в присъствието на комисията, на бюрото на съюза, на председателя на КК при ЦК на съюза, на касиера на строителния комитет и на счетоводителя на съюза. Съгласно по-раншно решение, обявено в бр. 4/1963 г. на БЕ, съюзът не приема повече непласирани марки-тухли. Всички получени и неотчетени досега марки-тухли трябва да се изплатят в най-скоро време. Дружества и отделни есперантисти, които желаят да внесат суми във фонда, могат да направят това, като преведат сумите направо във БИБ — Софийски клон по с-ка 10/4 за фонд „Постройка есперантски дом“. Марки-тухли повече няма да се пласират. Заедно със сумите да се изпраща уведомително писмо

49 UK DE ESPERANTO

La preparaj laboroj por la 49-a UK de Esperanto en Hago estas en plena kurso. La kongreso estas objekto de vasta enlanda kaj eksterlanda propagando. LKK dissendis al ĉiuj esperantistaj organizaĵoj kaj al unuopaj esperantistoj la Unuan Oficialan Bultenon. En ĝi abundas informoj pri la kongreslando, kongreskotizoj k. a.

Laŭ lastaj sciigoj al la venontjara kongreso aliĝis pli ol 270 bulgaraj esperantistoj. La Bulgara Esperantista Asocio estas superŝutita per leteroj de interesatoj pri eventuala organizo de komuna veturo al la kongreso. CK de BEA sciigas, ke la arango de karavana vizito al Hago estas ekster ĝiaj ebloj. Dezirantoj kongresi povus klopodi organizi sian veturon laŭ privata vojo. CK de BEA ne povas akcepti ankaŭ kongreskotizojn.

do съюза, за да бъдат публикувани в съюзния орган „Булгара есперантисто“.

Atanas Lakov

PROVO ALFRONTI LA VIVON

Originala poemaro de Ivan St. Georgiev, kun
antaŭparolo de Ujliam Old (William Auld). Eldo-
nis J. Régulo, La Laguna, 1962, prezo ne montrita.

Jen poemaro en kiu la aŭtoro per
versludado provas ne nur alfronti la
vivon, sed ankaŭ refuti la plej noblan
celadon de la homo jungi la vivon kaj
direkti ĝin per la poezio al perfekteco
kaj harmonio. Per siaj poemoj Ivan
St. Georgiev eluzas la versarton por
konduki la poezion al abstrakteco kaj
absurdeco.

En la poemoj de la grandaj poetoj
de ĉiuj epokoj oni sentas la pulson de
la novo kaj la progreso, de la senĉesa
strebo al triumfo de la vero kaj la
justeco. Tia estas la poezio ankaŭ de
multaj esperantistaj poetoj kiel L. L.
Zamenhof, A. Grabovski, K. Kaloĉaj,
Julio Baghy, Asen Grigorov k. a. Lerte
kuniginte la aktualajn problemojn de
la epoko kun la plej progresema strebo
de la homaro por la estonto la poezio
de tiuj poetoj fariĝas potenca armilo
de la homa spirito en la batalo por
pli bona kaj feliĉa vivo. Kaj pro tio
la vera poezio vivas eterne.

Male, el la poemaro de Georgiev
blovetas pesimismo, fuĝo de la vivo,
nekomprenemo de la vivproblemoj. Elu-
zante lerte la esprimopovon de la in-
ternacia lungvo por poezio kaj jong-
lante per vortoj kaj rimoj la aŭtoro
verkis poemojn formale belsonajn, sed
laŭenhave — palaj vizioj de efemera,
senigita de sana reala sento temaro.

Sed ni estu konkretaj!

— Ĉi mond' malvasta kaj mirinde fola
ne estas mia mond' revita:
erare jetis min ordono Dia. . .

Sed ni malamas vin, ho mond' frivola,
ĉar estas vi tro hipokrita,
kaj via rev' ja estas nur envia! (p. 19).

La supraj strofoj elokvente montras
ke la poeto ne povas eliri el sia limi-
gita persona koncepto pri la mondo
kaj pentras al ni tute falsan bildon
pri ĝi, li ne vidas kaj ne sentas la
grandiozan batalon, kiu bolas en la
mondo por ĝia ŝanĝo, el kio rezultas
tute la konstruo de nova mondo pli
justa kaj pli perfekta.

Ĉie kaj ĉiam la poeto vidas mal-
bonon, falsan kaj insidon.

— Falsas la viv'
falsas la ver'
falsas la pseŭda
mensfort'.

Triumfas malic'
triumfas malam'
triumfas l' insida
perfort'!

(p. 28)

Aŭ:

— Nekonata planed',
freneza popol',
ĉiniĝs via rol'!
Ĉar la sola rimed'
estas pere'! Ĉar la parol'
de la kreint' estas ĝusta
kaj brile jus.a. (p. 29)

Krom tiuj tute sensencaj, mistike-
religiaj kaj malklaraj poeziaĵoj en la
poemaro troviĝas ankaŭ ciklo titolita
„Belaj sensenciĵoj“ (p. 31). Kvazaŭ la
estetika kredo de la aŭtoro saturita foje
per belsona versknedaĵo elverŝas de-
kadencan mispoezion, kies ĉefa trajto
estas la sensenceco.

Do jen du:

— Sur kosma insulo
kun blua sunlumo —
kaj verda lunbulo
kun ringo — kolumo.
Sed nia stat' —
senespera ?



La vivo estas efemera
sur nia olda globo tera ... (p. 32)

En la poezio de Ivan Georgiev estas
nenia signo de impeto, nenia esperiga
sono de vivsigno, nenio plibonigebla
kaj plibonigenda en la vivo. La peza
kaj neevitebla malbona sorto perse-
kutos la homon eĉ ĝis la tombo.

— Eĉ en tombon
kiam venos,
mi la bridon
ne malbenos!
Ĉar ĝi estas fora forto
neŝanĝebla
eĉ post morto! (p. 51)

Kaj tiel ĝis la fino. Eĉ kiam la
aŭtoro tuŝas vere nuntempajn temojn li
ne scipovas doni al ni vere poezian
solvon.

— Estas homo
konscia
atomo...
Li fieras per sia
atombombo
kun aplombo...
Sed li ne vidas,
ke la ombro
de lia bombo
estas
homara tombo...

Ĉu vere? Ne!... Grandega parto
de la homaro bone konscias la pereigan
forton de la atombombo kaj kondukas
heroan batalon por ĝia neniigo. Kaj ni
kreditu, ke tiu batalo plene sukcesos. Ne
per la atombombo fieros la homo, sed
pri la granda sukceso de la scienco kaj
la malkovro de la atoma energio, kiun
li scipovos jungi por la bono de la
homaro.

Ankaŭ la poezio similas al la ato-
ma energio. Ĝi estas granda forto en
la manoj de la bonaj kaj talentaj poe-
toj kaj tiam ĝi portas nur utilon. Sed
kiam oni mispoezias, tio povas alporti
nur malutilon.

En la tuta poemaro oni povas trovi
nur kelkajn poemojn, kiuj montras, ke
Ivan Georgiev povus esti ne malutila

per sia poezio. Temas pri versaĵoj,
dediĉitaj al la naturo.

— Pluvgutetoj flave oraj
lante sub la arbojn falas,
lante flugas nuboj foraj —
horizont' nebule palas.

Sub dormema la nubaro
sunon voĉas mi sopiri —
sur l' aŭtuna ora ĉaro
amatinon nur admiri. (p. 46)

Same en „Printempa reveviĝo“
(p. 89) kaj kelkaj aliaj versaĵoj Geor-
giev alproksimiĝas al la realisma poe-
zio, kio montras, ke li povas, se li
kompreneble serioze eklaborus, reorien-
tigi al la realisma poezio. Per tio gaj-
nos la poeto mem, sed ankaŭ gajnos
la esperanta poezio.

La multflanka vivo en nia lando
estas neelĉerpebla fonto de temoj kaj in-
spiro por efektivigo de tia nova orien-
tigo en la versado de la poeto. Nur
tiamaniere li ligos sian poeziarton kun
la grandegaj streboj de la popolamasoj,
konstruantaj al si mem novan senpre-
cedencan kaj feliĉan estontecon. Kaj nur
tiam per sia poezio li montros al la le-
gantoj de aliaj landoj la belajn hori-
zontojn, kiujn konkeras tagon post ta-
go nia malgranda suna lando, en kiu
mankas ia ajn pravigo de la pesimismo,
ĉu en la vivo, ĉu en la poezio.

*Ĉiuj estraroj devas sciigi tuj al CK
de BEA la daton, la horon kaj la lokon de
la jarkunveno. De ties bona preparo kaj
okazigo dependas grandparte la pluaj suk-
cesoj dum la jaro.*

*Se iuj preterlasis la templimon por
abonigo al „Bulgara Esperantisto“, ili po-
vus aboni en la redakcio. Ni akceptos abo-
nojn ĝis la elĉerpiĝo de la eldonkvanto!
Ne forgesu: multaj abonantoj—forta asocio!*

Dudek-kvara leciono*

En mia memoro restis por ĉiam neelviŝeble gravuritaj la belaj kongresaj tagoj. Mi ne kuraĝas raporti detale pri la kongresaj laboroj. Amasiĝis abundaj impresoj, kiuj ne estas esprimeblaj.

Solena malfermo. Plenplena halo, riĉe ornamita per verdaĵo kaj esperantaj flagoj. Radiantaj vizagoj, festa humoro. Sur la estrado la gvidantoj de la tutmonda Esperanto-movado.

Aŭdiĝas la sonoj de la Esperanto-himno. Ĉiuj leviĝas solene kaj la himno ektondras el miloj da buŝoj.

Sekvas salutoj de oficialaj reprezentantoj de ŝtatoj, de internaciaj institucioj kaj de organizaĵoj. Sinsekve aperas ankaŭ delegitoj de la nacioj reprezentitaj en la kongreso. Elokventaj paroladoj, kiuj ankoraŭfoje vidigas la belsonecon kaj la perfektajn lingvajn kvalitojn de Esperanto.

En la sekvantaj tagoj estis laboraj kunsidoj. Oni diskutas, disputas, decidas... Vera parlamento.

Min altiras speciale la fakaj kunvenoj. Mi dezirus enrigardi en ĉiun ĉambron, kie kunsidas fakuloj el plej diversaj landoj de la mondo. Sed la tempo ne sufiĉas por resti ĉie kaj aŭskulti ĉion. Sinsekve mi eniras ĉe scienculoj, kuracistoj, instruistoj, poŝtofiscistoj, laboristoj, abstinuloj, vegetaranoj, blinduloj... Ĉie oni diskutas serioze, mature...

Tradicia teatra prezentado. Kvankam mi jam sentis la plenan naturecon kaj vivecon de Esperanto, la prezentado superis ĉion, kion mi atendis. Mi vidis kaj eksentis, kiom bele povas soni Esperanto en la buŝoj de bonaj artistoj.

Kaj la internacia koncerto, kaj la internacia balo, en kiu multaj partoprenis en naciaj kostumoj... Ĉu mi povus priskribi ĉion? Kaj la gaja ekskurso post la fermo de la kongreso?

Sed plej ĉarmajn rememorojn lasis ĉe mi la belaj vesperoj, kiam nia amika rondeto kolektiĝis por komuna manĝo. Tiuj komunaj vespermanĝoj ankoraŭ pli multe kaj forte proksimigis nin reciproke kaj cementis nian amikecon. Ni ekkonis nin senpere kaj pli intime.

En la lasta vespero regis jam ia ĉagrena sento pro la antaŭstaranta disigo. Rodrigues parolas:

— Kvazaŭ sonĝo restos tiuj ĉi kelkaj tagoj. Kian vivon donas al ni Esperanto! Flanke de la ĉiutaga prozo kian poezion ni trovas per ĝi en la vivo! Oni sentas sin vera homo inter homoj. Esperanto kulturas plej altajn sentojn, sentojn de estimo kaj ŝato al ĉiu individuo. Tiu ĉi vivo, tiuj ĉi rilatoj, kiujn ni vidas en la kongreso — ĉu ili ne estis la revo de la grandaj pensuloj kaj filozofoj de la pasintaj jarcentoj? Ĉu ili ne estas la idealo de ĉiu alta

* Per tiu ĉi leciono ni finas la kurson de Ada kiu dum pli ol du jaroj estis kun granda intereso studata de centoj da esperantistoj. En la nomo de niaj legantoj ni dankas al la aŭtoro pri la disponigo de tiuj utilaj lecionoj. Se iuj kamaradoj deziras havi la kompletan kurson, ili povas ricevi la aperintajn numerojn kun la lekcioj kun granda rabato, sendante al la redakcio la sumon nur de 2,20 lv.

religio, ĉu ili ne estas la bazo de ĉiu nobla socia ideo? Eble Esperanto baldaŭ sukcesos penetri kiel praktika instrumento en la ekonomian vivon de la popoloj, sed paralele al tio ĝi kulturos ankaŭ tiujn ĉi homajn rilatojn inter la nacioj. Kaj kiam en malproksima estonteco Esperanto venkos ankaŭ kiel ideo — ideo pri homeco kaj interhoma ŝato kaj solidareco, tiam vere en la vivon de la homaro venos io nova, alta...

— Se militoj ne haltigos ĝian marŝon — zorge intermetis Petersen.

— Militoj povos malutili kaj malrapidigi ĝian marŝon, tamen Esperanto estas io nemortonta — ĝi postvivos ĉiun militon kaj daŭros vivi...

Tiun ĉi profundan kredon mi portis kun mi, reveninte de la kongreso. Kaj unu sopiron: ree travivi la belajn tagojn de universala kongreso...

LA ESPERANTA STILO

Antaŭ multaj jaroj la eminenta samideano *Théophile Cart* (legu Teofil Kar), kiu estis ĝis sia morto prezidanto de la Akademio de Esperanto, donis la sekvantan koncizan regulon: *En Esperanto estas 1-e) nur unu stila regulo: skribi plej klare; kio estas klara, tio povas esti nekorekta, sed neniam malbona; 2-e) unu malpermeso: skribi malklare; kio ne estas klara, tio povas ifoje esti korekta, sed neniam bona.*

Sekvante tiun valoran konsilon kaj legante klasikajn verkojn de la literaturo de Esperanto, ĉiu esperantisto povas akiri bonan kaj klaran stilon de Esperanto.

NOTINDAJ VORTOJ

fakulo = specialisto, homo apartenanta al iu fako de la scienco, ekonomio ktp.
estonteco — estonta tempo, la tempo, kiu venos. Kelkiuj uzas ankaŭ la pli simplan formon *estonto* (kiel same: *pasinteco* — *pasinto*).
intermeti — diri ion meze da la parolado de alia persono.

EKZERCOJ

Provu doni per aliaj vortoj iujn esprimojn el la legaĵoj de la lastaj lecionoj de tiu ĉi lecionserio.

Korekto

En n-ro 10 de nia gazeto (oktobro 1963) en la leciono 22 de ADA estas ripetita eraro, enlasita ĉe la presigo de la sama leciono siatempe en Francio (revuo „*Esperanto et Culture*“), nome: sur paĝo 7, linio 20 de supre, la alineo „Kaj de tempo al tempo...“ estas parto de la legaĵo „Veturo al la Kongreso“ kaj ĝia loko estas sur paĝo 6 post la alineo „La formalizaĵoj pasis...“

Sur paĝo 6 linio 10 de malsupre legu „Ni estis veturantaj“ anstataŭ „Ni estis veturantaj“.

EL SOVETUNIO

Moskvo. Dum la pasinta somero Esperanta Sekcio ĉe Centra Kulturdomo de Medicinistoj transportis sian amaslaboron en la freŝan aeron. Ĉiusemajnajn renkontiĝojn de Moskvaj gesamideanoj oni komencis aranĝi en la Centra Parko por Kulturo kaj Ripozo „Gorkij“. Ĉiuj someraj renkontiĝoj

estis dediĉitaj al la aktualaj problemoj de Esperanta movado. Plej multe oni interparolis pri la estonta 48-a U. K. en Sofio kaj pri la V-a Balta Esperanta Tendaro de junularo kaj studentoj en Estonio.

Per „Inturist“ sub aŭspicioj de Domo de Amikeco estis organizita sovetia

grupo el 33 gesamideanoj, kiu la 30-an de julio forveturis al Sofio, kie ĝi partoprenis la 48-an UK.

La Moskva Domo de Amikeco eldonis en Esperanto kantarono kun muziknotoj de sovetaĵoj kantoj kaj kanzonoj, kiun la deligitaro prenis por disdoni dum la Kongreso kiel memoraĵon.

De la 21-a ĝis la 31-a de julio 1963 estis aranĝita kaj sukcese okazinta la unua grupo de la V-a Baltlanda E-Tendaro, brile organizita de niaj Estonaj samideanoj en pitoreska arbarloko Värksa sur la vasta bordo de golfo de l' granda Pskova lago.

De la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto okazis la somerumo de la dua grupo de la Tendaro, kiun partoprenis 299 personoj el diversaj lokoj de Sovetunio. Dum la solena malfermo, kiu okazis la 2-an de aŭgusto, la verdan standardon de la Tendaro levis la plej juna partoprenantino — lernantino Ubar el Tal-lin kaj ĉiuj kantis himnon „La Espero“.

La tendumo pasis tre bone, dis-ciplinite, sukcese kaj gaje. Ĉiutage okazis amika rondo kaj matena gimnastiko, somera universitato, koncertoj kaj amuz-vesperoj, dancado kaj ludoj, ekspozicio de esperantaĵoj por kiu en la klubejo estis disponigita speciala ĉambro, mur-gazeto „La Tendara Standardo“, eks-kursoj per la ŝipo kaj aŭto, sunbanado, plonĝado kaj naĝado en la lago, pro-menoj en la arbaroj kaj boatpromenoj sur la lago.

Dum la tendumo estis nomitaj ko-ordinaj delegitoj por estontaj tendaroj; la sekvonta tendaro (VI-a) okazos en Litovio somere de 1964. Por Moskvo kiel delegito estis nomita juna esperan-tistino Galja Stanesnikova. K-do A. Si-las (Litovio) voĉlegis projekton de sta-tuto de la estontaj tendaroj. La tuta tendumado pasis sub la slogano: „Per Esperanto por mondpaco kaj amikeco“.

La 18-an de aŭgusto en la Kultur-parko okazis esperantista kunveno, dum kiu k-do E. Salmikov (unu el la delegitoj,

partoprenintaj la 48-an U. K.) tre vikle kaj interese rakontis pri siaj impresoj de la Kongreso. Pri la specialaj trajtoj de la 48-a U. K. (grandiozece, mult-nombrece kaj bona organizo) parolis k-do N. Danovskij. Aldone al liaj vor-toj parolis la aktoro N. Rytjkov, kiu plejparte rakontis pri la kulturarangoj de la kongreso, nome pri la dua arte-stivalo kaj pri la internacia somera uni-versitato. Li ankaŭ rakontis, ke soveta Esperanto-poeto K. Gusev tie verkis kanzonon pri Sofio, kiun oni komune kantis dum la adiaŭa vespero en la re-storacio „Balkan“ kaj dum la tuta re-venvojaĝo, eĉ ĉe la Bukureŝta stacido-mo sonis tiuj ĉarmaj vortoj laŭ la me-lodio de la konata soveta kanzono „Lubimyj gorod, moĵet spatj spokojno“ (Amata urbo, dormu en trankvilo). La teksto de tiu ĉi kanzono estas publiki-gita en la kongresnumero de „Heroldo-de Esperanto“.

La 28-an de aŭgusto en la Kultur-parko oni aŭskultis la rememorojn de la partoprenintoj de 48-a U. K. Kun siaj impresoj, skribitaj en formo de vojaĝ-notoj — aperis la Esp. poeto K. Gu-sev. Li vikle notis ĉiujn detalojn de la interesa vojaĝo kaj de la majesta kon-greso mem, kaj priskribis ĉiujn apar-tajn dumkongresajn ĝeneralajn kaj fa-kajn konferencojn kaj ekskursojn.

La 1-an de septembro 1963 Espe-ranta kunveno en la parko estis dedi-ĉita al jenaj memorindaj datoj: 18 jaroj de Vjetnama Demokratia Respubliko; 100 jaroj de internacia organizaĵo „Ruĝa Kruco“; la ora jubileo de la soveta Esperanto-poetino Ludmila Ev-sejeva (nask. la 14-an de aŭgusto 1913); 5-a datreveno de la morto de eminenta Soveta Esperantisto — profesoro I. Ru-kavicin, pri kiu skize parolis k-do E. Salmikov.

La kunvenon ĉeestis pli ol 100-personoj.

T. Kulagin



LA NOVA LERNOJARO

Post la internaciaj Esperanto-kongresoj okazintaj ĉi somere en nia lando, nun en ĉiuj urboj oni povas klare rimarki konsiderindan intereson al la internacia lingvo. Utiligante tiun intereson la lokaj Esperanto-societoj organizis multajn novajn kursojn de Esperanto. Aparte ĝojiga estas la fakto, ke multajn kursojn oni malfermis en la lernejoj. Ni devas tamen substreki, ke la kurso estas nur la unua paŝo, kiun nepre devas sekvi organizitaj klopodoj por alti de la gekursanoj al la vivo de la Esp.-societo, al la organizita Esperanto-movado.

Interalie atingis nin informoj pri jenaj novaj kursoj:

Kubrat — kurso por civitanoj gvidata de Ĥr. Dimitrov, kurso por ĝelernantoj en la gimnazio gvidata de Iv. Alahverĝiev kaj por lernantoj en elementa lernejo gvidata de Ilia Marinov.

St. Dimi'rov — kurso por lernantoj gvidata de B. Drenski.

Sofio. S-to „M. Gorkij“ okazigas en sia klubejo sur str. Pozitano 16 a ĉiuvespere kursojn por komencantoj. Iujn tagojn funkcias po 2 kursoj.

Levs i. La 5-an de oktobro antaŭ la lokaj esperantistoj kaj aliaj civitanoj parolis la pola esperantisto Ĉeslav Volĉik. Jam du monatojn li estas gasto en nia lando. Interalie li rakontis siajn travivaĵojn en la faŝistaj malliberejoj kaj koncentrejoj dum la lasta milito. Fortan impreson al la ĉeestantoj faris lia sciigo, ke okaze de la miljara datreveno de sia fondiĝo, la pola ŝtato, ĝia registaro decidis konstrui 1000 novajn lernejojn.

K. Tocev

PAZARĜIK. La 11-an de VIII, 1963, dimanĉe, post la 48-a UK en Sofio vizitis nian urbon 18 eksterlandaj gastoj el Israelo, Francio, Hungario, Pollando, Nederlando kaj Germanio. Bonvenigis ilin per salutparolado k-do Petrinski en la nomo de la puckomitato kaj k-dino N. Markova — direktorino de la Sindikata Domo. La sekvintan tagon la eksterlandanoj ekskursis al Velingrad, Peŝtera kaj Batak. Ĉiuj gastoj estis tre kontentaj.

La 28-an de aŭgusto 1963 s-ro G. Pomplio denove estis inter ni en Pazarĝik. La saman vesperon okazis kunveno kun pli ol 30 ĉeestantoj, bonvenigis lin nia honora prezidanto k-do I. Vasilev, dankinte pri lia vizito.

La 11-an de septembro 1963 okazis la

GRAVA KUNVENO EN SOFIO

La Asocio de la sciencaj laboristoj en Bulgario organizis la 4-an de novembro en unu el la plej grandaj aŭditorioj de la Sofia Ŝtata Universitato publikan kunvenon je temo „La problemoj pri la internacia lingvo“. La kunvenon gvidis prof. Blagovest Dolapĉiev, vicrektoro de la Ŝtata Universitato en Sofio. Pri la temo prelegis la konata bulgara esperantisto Atanas D. Atanasov — ADA, lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato. En sia interesa prelego li skizis la sciencan kaj socian aspekton de la problemoj pri la multlingveco kaj ĝia konstanta pliakriĝo en la nuntempa mondo. Li analizis la provojn pri solvo de la problemoj kaj speciale pri multaj ekzemploj kaj historiaj faktoj li motivigis la solvon, kiun prezentas la internacia lingvo Esperanto.

La fakto mem, ke la Asocio de la Sciencaj Laboristoj iniciatis la arangon de tiu kunveno, montras, ke la problemoj pri la internacia lingvo altiras nuntempe la atenton de la intelektuloj kaj ĝia solvo estas nun konsiderata kiel aktuala tasko de la scienco. Estas bedaŭrinde, ke la kunveno ne estis bone diskonigita kaj ĝin ĉeestis precipe esperantistoj.

S. S.

LOVEĈ. La Plenumkomitato de la Urba Popola Soveto decidis alinomi la trafikplanan straton „Sofijska“, okaze de la 48-a Universala Kongreso — „Esperanto“.

La Urba Popola Soveto en Loveĉ disponigis al la E.-s-to klubejon sur strato „Esperanto“ kie ankaŭ troviĝas la bulgara-soveta societo kaj kies adeptoj kunlaboras por la komuna celo — paco inter la popoloj.

unua kunveno post la UK kun tagordo: antaŭstarantaj taskoj; la nova lernejo; kunsido de la estraro.

Laŭ la unua punkto ni pridiskutis pri la abonotizo kaj abono al revuoj, pri aĉeto de esperanta literaturo por la societa biblioteko, pri la ekskursoj ktp.

Laŭ dua punkto la societo decidis malfermi kursojn de Esperanto en la Sindikata Domo kaj en la lernejoj en la komenco de oktobro; en la entrepenejoj — en januaro. En la fakultato de Esperanto okazos la kursoj por ko-nencantoj, progresintoj kaj por perfektigo, laŭeble dufoje semajne.

GASTAMA AKCEPTO

Dum la 48-a U. K. de Esperanto la bulgaraj esperantistoj klopodis en ĉiuj okazoj manifesti sian gastamon al la kongresanoj. Nun, eĉ du monatojn post la Kongreso, el multaj landoj senĉese alvenas leteroj, saturitaj je simpatio kaj dankemo al la gastigantoj.

Ni publikigas fragmentojn el la manuskripto, titolita „Gastama akcepto fare de la esperantistoj en Pazarĝik“.

Post la grandioza 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio ni venis, laŭ invito de nia amiko Petko Arnaudov, dudekope, al la urbo Pazarĝik. Tuj post nia alveno, la urbestro oferis al ni, en tre idilia subĉiela restoracio, bongustan kaj abundan manĝaĵon. En la nomo de ĉiuj, ni tutkore dankas al la urbestro pro tiu vere bonega akcepto. Ĝojo kaj amika etoso regis dum la manĝado en nia internacia grupo de esperantistoj. La neesperantistoj de Pazarĝik, kiuj akceptis kaj akompanis nin, miris pri nia vigla interbabilado kaj konstatis la admirindan taŭgecon de nia Esperanto kiel internacia interkomprenilo. Ĉeestis hungaroj, germanoj, francoj, poloj, israelanoj, nederlandanoj kaj kompreneble niaj karaj bulgaraj gastigantoj.

Posttagmeze ni rigardis la urbon. Ĉie ni vidis novkonstruitajn kaj konstruitajn domojn, butikojn kaj aliajn konstruaĵojn, kiuj montris, ke la lando estas en plena konstruo.

Je la sesa horo en la kulturdomo okazis speciale aranĝita Esperanto-kunveno. Granda estis la intereso. Multaj personoj atendis nin tie. La junpioniroj bonvenigis nin per bukedoj da floroj. Tiu ĉi simpatia saluto estis aparta surprizo por la eksterlandaj gastoj. Reprezentantoj de ĉiuj ĉeestantaj nacioj parolis kelkajn vortojn al la kunveno kaj nederlanda amiko montris lumbildojn pri sia lando. Nia plej juna grupano, dekkvarjara hungarino, prezentis al la publiko hungaran popolan dancon. Internacia programo, internacia lingvo, multnaciaj grupoj, tio estas la plej bona rimedo por krei la amikecon kaj la pacon inter la popoloj.

Vere kortuŝa estis la akcepto fare de la familio Arnaudov al ni ĉiuj dum la vespero. Ni manĝis kune en ilia domo abunde kaj ĝissate kaj denove regis tie la karakteriza amikeca etoso, kiu povas esti en internacia, en multnacia medio, nur kiam oni povas flue interkomprenigi.

La sekvintan tagon okazis nova surprizo. Aperis antaŭ nia hotelo aŭtobuso, kiu portis nin al urbo Velingrad. Nin akompanis kelkaj esperantistoj de Pazarĝik. Survoje ni vizitis la hidroelektran centralon Peŝtera. Ĉi estas ekzemplo pri la granda evoluo, kiu okazas en nuntempa Bulgario. Tra longega tunelo ni atingis ĝian interonon, kie teknikisto klarigis al ni la funkcion de la maŝinaro.

Batak estis la dua haltejo, por spekti la monumentan preĝejon en kiu dum la turka jugo, oni buĉis centojn da virinoj kaj infanoj. Tiu buĉado signifis la ekfalon de la turka jugo. Ni vidis la ĉerkezojn en kiuj oni konserveas la ostojn de la herooj el la ĵus pasinta milito, kiuj daŭrigis la tradicion de liberamo de la bulgara popolo.

En Velingrad la esperantistoj atendis nin kaj aranĝis tranoktadon. Dum la vespero nia aŭtobuso portis nin al la granda fonto Kleptuza. En tiu bela regiono ni spertis, ke ankaŭ en Bulgario povas esti malvarme dum somera vespero! Feliĉe bona orkestro invitis nin al dancoj kaj tiamaniere ni plivarmigis nian sangon. La sekvantan tagon ni intencis viziti la muzeon pri la heroo partizano Vela Peeva, kiu same kiel ni estis esperantistino. Sed oni estis rekonstruantaj la domon, kaj ni devis ŝanĝi niajn planojn.



Por iom forigi nian seniluziigon, ni iris al la sanatorio por vilaĝanoj en la montara ĉirkaŭaĵo de Velingrad. Tre afable oni akceptis nin tie, kondukis nian grupon tra la tuta sanatorio kaj multe klarigis pri la kuracmetodo de la reŭmatismo de la vilaĝanoj. La kuracista direktoro akceptis nin en sia ĉambro kaj oferis glason da bona vino al nia internacia grupo, kiu kun tiom da intereso rigardis la laboron por la sano de la bulgaraj civitanoj.

Akompanate de kelkaj velingradaj esperantistoj ni daŭrigis nian ekskurson al Jundola. Trapasinte belajn montarajn regionojn ni finfine atingis la antaŭviditan ripozlokon. Vera ripozloko! Grandaj herbotapiŝoj, multaj pinarboj, tro freŝa aero pro la konsiderinda alteco de la loko (proksimume 1 500 m.), kvazaŭ sentebla silento. Ni tutkore dankas ankoraŭfoje la velingradajn amikojn pro la bona organizado de la ekskurso kaj pro ilia gastameco bulgara, kiu povas esti ekzemplo por la tuta mondo.

La aŭtobuso reveturis tra Rodopimontaro al Paragik, kie bedaŭrinde jam finiĝis nia restado. La lasta vespero en amika rondo ĉiam estas iom malĝoja, ĉar la disiĝo atendas ĉe la pordo. La familio Arnaudov ree aranĝis neforgeseblan vesperon en sia domo: abunda regalo, kantado, aŭskulto de sonbendigitaj intervjuoj kun советaj esperantistoj, renkontiĝo kun niaj fidelaj geamikoj. La lasta vespero kvazaŭ forflugis. Pasis noktomezo kaj ni forlasis la domon de la familio por la lasta fojo. La postkongresa ekskurso estis finita, sed la rememoroj pri tiuj belegaj tagoj restos por ĉiam ĉe ni. La geesperantistoj de Pazarĝik aranĝis por ni vere neforgeseblajn tagojn.

Multan dankon pro ĉio kaj ĝis revido!

Katrin Bossong-Singer
Eindhoven, Nederlando

HARMONIO

Al la 48-a de Esperanto en Sofio, 1963:

Mirinde estas, ke en grandorkestro diverse vibras preskaŭ ĉiu kord', estigos tamen ĉarma bel-akord', se ĉiu ludas laŭ gvidad' de l' estro.

Nacioj, rasoj, lingvoj, pensoj estas diversaj, sed en nia frata rond' foriĝas vandoj; vundoj de la mond' mildiĝas; amo, ĝojo daŭraj restas,

ĉar havas ni ideon gvidan, veran — do brave sekvu ĝin ni kun fidel' — ĝi certe venkos ĉian baron teran,

realo iĝos nia kuna cel': konkordo, paco sur la tero, nia kaj por la tuthomaro — harmonio.

Julio Varga
Hungario

SALUTON AL SOFIO

Ni salutas vin Sofio kara,
kaj brakumas vin de l' tuta kor'.
Antaŭ via nobla loĝantaro
ni nin klinas laŭ la rusa mor'.

Ni antaŭe vin neniam vidis
nin venigis la facila vent',
sed veninte ni ne povas bridi
nian ĝojon per amika sent'.

Ho, Sofio, belulin' bulgara,
brilu vi konstante kaj sen fin'
kaj soveta esperantistaro
pro l' gastemo ege dankas vin.

Ni en vi salutas tutan mondon, —
ĉiun domon de la bona vol',
la pacaman Esperanto-rondon,
la forumon de l' elit' — popol'.

Ĝi sukcesis — nia Kvardekoka
en batal' por lingvo kaj por pac',
kaj en la subteno reciproka
ni antaŭen marŝu kun aŭdac'.

Aŭgusto 1963

Petro Poliŝĉuk
Taŝkent, USSR

La redakcio de BE gratulas siajn legantojn okaze de la nova jaro kaj bondeziras ĝojan vivon kaj grandajn sukcesojn sur la Esperanto-kampo dum

1 9 6 4

En ĵ. „**Cărkoven Vestnik**“ — Sofio (22. VI. 1963) aperis artikolo „Esperanto — lingvo de frateco kaj paco“ de pastro V. Jakov el urbo Târgoviște. La artikolo estas dediĉita al la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio.

En ĵ. „**Zarja na Komunizma**“ — Loveĉ (3. VII. 1963) — artikolo titolita „Antaŭ la kongreso de la esperantistoj“.

En „**Haskovska Tribuna**“ — Ĥaskovo (4. VII. 1963) — informo de Ĵeko Zaprianov — „Antaŭkongresa renkontiĝo de esperantistoj“. La aŭtoro rakontas pri la renkontiĝo de esperantistoj el Haskovo, Dimitrovgrad, Ĥarmanli, Ljubimec, Svilengrad ĉe la loko „La Fonto de la Blankpiedulino“ apud Ĥarmanli. La loko estas prikantita en la beleaga poemo kun la sama titolo de Penĉo R. Slavejkov. La partoprenintoj metis florkronojn al la tomboj de la esperantistoj Margarit Gogov kaj Kosta Angelov, mortigitaj en la jaro 1935.

En ĵ. „**Iskra**“ — Kazanlâk (6. VII. 1963) — longa artikolo de Ivan Zahariev, sekretario de esperantista societo „Roza Valo“, titolita „Floru rozoj kaj verdaj steloj“. La aŭtoro rakontas interese pri la varia agado de la societo konekse kun la 48-a Universala Kongreso de Esperanto.

En „**Zdraven Front**“ — Sofio (13. VII.) — artikolo de d-ro St. Kadiev „Por la paco kaj la amikeco inter la popoloj“ dediĉitaj al la 48-a UK.

En ĵ. „**Ludogorska Pravda**“ — Razgrad (13. VII.) — informo de Ilija Marinov pri la agado de la esperantista societo en Kubrat konekse kun la 48-a UK.

En ĵ. „**Narodno Delo**“ — Varna (18. VII.) — artikolo de Cvjatkio Jolov „El la bataloj de la progresemaj studentoj en Varna“, en kiu la aŭtoro mencias la nomon de la esperantista societo en Varna.

En ĵ. „**Veĉer i Novini**“ — Sofio (22. VII.) — informo pri vesperfersto en Rio de Ĵaneiro dediĉita al Bulgario — la kongreslando.

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ — Sofio (24. VII.) — informo pri la varia agado de la esperantista asocio en Brazilio, dediĉita al Bulgario konekse kun la UK.

En ĵ. „**Veĉerni Novini**“ — Sofio (24. VII.) — anonco pri la poŝtmarko dediĉita al la Kongreso.

En ĵ. „**Zarja na komunizma**“ — Loveĉ (24. VII.) — informo de Donka Petkova „Atendante la 48-an Universalan Kongreson de Esperanto“, „Intervjuo kun akademiano Vladimir Georgiev, vicprezidanto de Bulgara Akademio de la Sciencoj kaj elstara lingvisto“, „Unu

granda sukceso“ de Stojko Fortunov — pri nomigo de strato „Esperanto“.

Ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ — Vraca (27. VII.) — estas dediĉita al la 19-a Junulara Esperanto-Kongreso kun artikoloj plej interesaj de la urbestro L. Janĉev, de G. Beker „Tio, kion mi vidis, superis ĉiujn miajn atendojn“, de Hr. Cekov — „Unuaj renkontiĝoj“, de S. Simeonov „Kion prezentas TEJO?“, de Radoslav Triĉkov — „Kvardek jarojn da esperantista organizaĵo en Vraca“, „Programo de la kongreso“, „Urbo Grametto kaj Dimitrovgrad interfratigitaj per Esperanto“, kaj aliaj informoj.

Ĵ. „**Iskra**“ — Kazanlâk (21. VII.) — artikolo de Iv. Zahariev „Utila iniciato“ — en vilaĝo Enina oni metos granitan platon kun surskribo honore al la kreinto de Esperanto D-ro L. L. Zamenhof.

Ĵ. „**Orjaĥovska Tribuna**“ — Orjaĥovo (27. VII.) — artikolo „Insulo Esperanto“ de Nikola M. Kocov kaj Georgi Stanev.

Revuo „**Filatelien Prigled**“ — Sofio (n-ro 7 — 1963) — artikolo „Du ideoj — du standardoj por internacia proksimeco kaj tutmonda paco“ de Iv. N. Daskalov.

Ĵ. „**Dunavska Pravda**“ — Ruse (3. VIII.) artikolo de Hr. Stambolov „Festo de la Bulgaraĵ esperantistoj“ — pri la agado de la esperantistoj konekse kun la 48-a Kongreso.

Ĵ. „**Ĥimik**“ — Dimitrovgrad (8. VIII.) — artikolo „48-a Universala Kongreso de Esperanto inaŭgurita“.

Ĵ. „**Transportna Iskra**“ — Sofio (16. VIII.) — artikolo „Esperanto — fenestro al la mondo“ de D. Popov.

Ĵ. „**Zarja na komunizma**“ — Loveĉ (17. VIII.) — anonco pri la parolado de Roĵe Blanka „Tra la urboj kaj kampoj de Centra Francio“, kiu okazis la 10-an de aŭgusto.

En la sama ĵurnalo (21. VIII.) — artikolo „Veturado al la luno“ tradukita el Esperanto de Kiril Kalĉev.

Ĵ. „**Ĥimik**“ — Dimitrovgrad (22. VIII.) — artikolo „Internacia amikeco“ kun fotografaĵo okaze de la vizito de la urbo fare de familio Holms el Londono.

Ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ — Sofio (28. VIII.) — artikolo „Modernismo aŭ io alia?...“ de C. Ignev — kritiko pri la aperinta verskollektio „Provo alfronti la vivon“ de Ivan St. Georgiev.

Ĵ. „**Veĉerni Novini**“ — Sofio (16. IX.) — anonco pri kursoj, kiujn malfermos la esperantista societo „Maksim Gorkij“.

Vasil Tabakov estis nek instruisto, nek kuracisto, nek eksfabrikisto, li estis ordinara laboristo-ŝpinisto, kiu unua en Gabrovo ankoraŭ en 1902 jaro ekparolis pri la internacia lingvo Esperanto. Li kunlaboris al la esperanta gazeto „Semo“, eldonita en lia naskiĝurbo de Dim. Malčev.

Vasil Tabakov estis kvieta, modesta, aminda kaj laborema popola aganto, kies modela vivo en la aŭtodidakta lernado devas ankaŭ hodiaŭ inspiri la gejunulojn. Nur kun unuagrada klereco (IV klaso), li per konstanta laboro super la libroj kreskis kiel flama esperantisto, socialisto kaj abstinenculo.

Naskita en 1879 jaro en Gabrovo, kiam li estis 4-jara, lia familio transloĝiĝis en urbo Stara Zagora, kie li travivis sian malgajan infanecon. Li kreskis en laboro kaj mizero, kiuj lin hardis. La socialismaj libroj edukis lin bone kompreni sian socian staton. Li estis kunlaboranto de Georgi Kirkov kaj Evtim Dabev en Stara Zagora kaj en 1898 jaro li fariĝis membro de la Social-Demokrata Partio, kaj fondis kune kun Váľto Vračev kaj Stojan Ovčarov — laboristan interhelpan societon „Konsento“. Krom la legado de progresema literaturo, kiun li tre ŝatis, li ricevis socialistajn revuojn (ekzemple „Klopodo“, kiun li ĝis la morto gardis), kaj per legado fariĝis klera socialisto.

Tabakov konatiĝis kun la kolorigisto Sava Váľčanov, kiu komencis tiutempe lerni Esperanton. Li ankaŭ „infektiĝis“ kaj komencis kun neordinara persisteco lerni la novan lingvon de d-ro Zamenhof kaj en 1904 fondis esperantistan rondon en Stara Zagora.

En 1911 li denove transloĝiĝis en Gabrovo-n, kaj kune kun Vasil Právčev, Jordan Sutrinkov kaj la albano Azis fondis esperantan rondon „Semo“, sed la militjaroj trafis la vigitan verdstelanon „kvaropon“. En jaro 1919 Tabakov fondis laboristan esperantan rondon „Karl Libknecht“, kiu en 1920 alinomiĝis „Verda Torĉo“. Efektive la verda fajreco de Tabakov fariĝis torĉo neestingebla, kiu lumigis la vojon de la progresema junularo al paco, amikeco, al socialismo, al abstinenco en la mondo. Tabakov mem estas unu el la unuaj bulgaroj kiu membriĝis al UEA en Ĝenevo kaj SAT en Parizo.

Kiam en 1955 la societo renovigis sian agadon Tabakov estis profunde emociita kaj

Georgi N. Sapunĝiev naskiĝis la 24-an de julio 1898 en urbo Tolbuhin. Li finis gimnazion en Varna kaj fariĝis oficisto en la Ministerio de la justeco en 1919. En 1920 li estis instruisto en vilaĝo Sárnel, regiono de Sofio, kaj en vil. Nikolaevka kaj Vodica, regiono de Varna. En 1923 oni eksigis lin pro lia partopreno en la Septembra Ribelo. Li elmigris al Rumanio kaj revenis en 1924 en Bulgarian. En daŭro de 8—9 jaroj li estis senlabora kaj gvidis multajn esperantajn kursojn. En 1932 oni oficiigis lin kiel bibliotekisto en la Urba Biblioteko en Varna kie li laboris ĝis 1952, kiam li pensiuliĝis pro malsano kaj venis en Sofion.

Sapunĝiev fariĝis esperantisto en 1921 kaj senĉese laboris por Esperanto ĝis la malsaniĝo.

Li publikigis multajn artikolojn en la ĉiutagaj ĵurnaloj de Varna kaj verkis la propagandan broŝuron „En la matenlumo de la verda stelo“ (en bulgara lingvo), kiu aperis en 1934. Li tradukis en bulgaran lingvon la rakontojn „Funebro“ (el „Literatura Mondo“), „La kiso“, la romanon „El la reĝolando de la lepruloj“ de V. Siroŝevski, la novelojn de S. Lagerljof, eldonitajn en aparta broŝuro kiel n-ro 2 de Biblioteko „Sereneco“, la romanon „Nefinkantita kanto“ de Eliza Ojesko, la rakontojn de S. Lagerljof „Ŝi intence kantis false“, „La mano de la providenco“, „De venĝo vi ne forkuro“. Li tradukis ankaŭ bengalajn, ĉinajn, japanajn, rumantajn, norvegajn k. a. fabelojn. Sapunĝiev tradukis en Esperanton la rakonton „Gardu nin, Dio, de nobeliĝinta simplulo“ de Aleko Konstantinov kaj „Mamra“ de Nikolaj Rajnov.

En daŭro de multaj jaroj G. Sapunĝiev korespondis kun la Estona esperantistino Hilda Dresden. Ŝi vizitis dufoje Bulgarian kaj li vizitis Estonion unu fojon.

G. Sapunĝiev mortis je la 1-a de novembro 1963 en Sofio. I. S.

donacis al ĝi sian bibliotekon kaj kelkajn konservitajn numerojn de „Semo“.

La fervora esperantisto kaj honora prezidanto de Societo „Verda Torĉo“ V. Tabakov mortis la 25-an de oktobro 1963 en Gabrovo.

Estu eterna lia nomo!

Ĉefredaktoro: Violin OLANOV

Redakta komitato: Kiril DRAJĖV, Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV

Korektis: Delka Ĉolakova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 3-26-82

DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

D-r med. dent. Z. Bakarĝiev, stomatolog,
Dom-kabineto Gorubljane, Sofio 38. — kun ĉi
kaj bulgaroj.

Angel Kocev Angelov, v. Moravica, Vra-
ĉansko, per il. PK.

Kostadin Ĉiĉanov, ul. Sofroni 133, Sofio,
kun agronomoj el ĉi.

Dimitr Iliev Dobrev, Asenovgrad, ul. Ko-
pinarska 10 — pri ĉi.

ĈEĤOSLOVAKIO

Rygel Jaroslav, (32-jara) metalurgia labo-
risto, Osrava-Hrabuvka, Horni 959, bl. H. ko-
lektas cigaredojn, alumetikedojn k. a.

POLLANDO

Maria Pasink, (17-jara) lernantino, Zielona
Góra, ul. Sureczenskigo 51.

BRAZILIO

Prof. Francisko Correa Neto proponas slajn
lernantojn kiel interesajn korespondantojn al
la tutmonda esperantista ĝelernantaro pere de
la jena adreso: Ginásio Lara Vilela, Travessa
Manuel, Continentino, PE-31, Niterei — Brasil.

USSR

Ĥarkov, 3. p. k. 104, Esperanto.

Aristarhov K. Ju., Leningrad — D 40, do
vostrebovanija. Kolektas alumetikedojn. Res-
pondo garantiita.

Leonas Mazeika (studento), Z. Uk. Techni-
kumas, Rietavas, Litovio — kun ĝejunuloj pri
ĉi. el ĉi.

Lošakov Valera Al. (18-jara lernanto), Ĉe-
ljabinskaja obl., gor. Ust-Katav, ul. Kalinina
d. 6-a.

Aseev Pavel (16-jara lernanto), Ĉeljabin-
skaja obl., gor. Ust-Katav, ul. Tolstogo, d. 10

MONTO-DOMO „ESPERANTO“

NOVAJ KONTRIBUINTOJ:

A. Sokolova, Zdolbunovo, USSR . . .	16 lv.
H. Luebner, GER	5 „
A. Hoftman, Nederlando	4 „
J. Verhaeg, GER	3 „
R. Aagard, Novzelando	2 „
A. Coyvcerts, Nederlando	1 „

